# KOMUNIKOJ

TRIMONATA BULTENO DE SPIRITISMA ELDONA ASOCIO F. V. LORENZ

Jaro 43-a BRAZILO, JANUARO-FEBRUARO-MARTO 2020 N-ro 177


"Amu vian Dion per via tuta koro kaj per via tuta animo kaj per via tuta menso kaj vian proksimulon kiel vin mem."
JESUO (*Mt*, 22:37-40).

"Neskuebla fido estas nur tiu, kiu povas rekte rigardi la racion en ĉiuj aĝoj de la homaro."
KARDEC. *La Evangelio laŭ Spiritismo.* Ĉap. 19, §7.

"Sur neŭtrala lingva fundamento, komprenante unu la alian, la popoloj faros en konsento unu grandan rondon familian."
ZAMENHOF. *La Espero*.

# NENIU VIVAS AL SI

**"Ĉar neniu el ni vivas al si mem."**
Paŭlo (Romanoj, 14:7)

La arbo, kiun vi plantas, produktas ne nur por via malsato sed ankaŭ por helpi la bezonojn de multaj.

La lumo, kiun vi ŝaltas, heligos la vojon ne nur por viaj piedoj sed ankaŭ por apudirantoj al vi.

Same kiel akvoflueto agas sur la teron kie ĝi fluas, ankaŭ viaj decidoj inspiras aliulajn decidojn.

Miloj da okuloj observas viajn paŝojn, miloj da oreloj aŭdas vian voĉon kaj miloj da koroj ricevas viajn instigojn al bono aŭ malbono.

"Neniu el ni vivas al si mem..." - certigas al ni la dia Mesaĝo.

Vole-nevole, la Leĝo preskribas, ke nia vivo apartenu al la nin ĉirkaŭantaj vivoj.

Ni vivas por niaj familianoj, niaj amikoj, niaj idealoj...

Eĉ ekskluzivema avarulo, kiu sin rigardas soleca, vivas por la oro aŭ por la utilaĵoj, kiujn li redonos al aliaj vivoj, superaj aŭ malsuperaj, favore al kiuj la morto forprenos lian trezoron.

Komprenante tian realaĵon, observu vian propran vojon.

Sentante, vi pensas.

Pensante, vi plenumas.

Kaj ĉio konsistigas viajn farojn, intencojn, parolojn kaj agojn montriĝos kiel influado de via animo, helpante vian liberiĝon al la gloro de la lumo aŭ pligravigante vian kaptitecon por suferado en la ombroj.

Viglu do en via intima mondo kaj faru la bonon, kiun vi povos, ankoraŭ hodiaŭ, ĉar, laŭ la saĝa instruo de la Apostolo Paŭlo, "neniu el ni vivas al si mem".

Spirito: Emmanuel
Mediumo: Francisco C. Xavier
El la libro: *Viva Fonto*



# AMIKOJ DE LORENZ



Cesar Soares dos Reis, brazilano, profesoro, preleganto, militisto, spiritisto, esperantisto, nuntempa prezidanto de Spiritisma Kultura Instituto de Brazilo, aŭtoro de pluraj spiritismaj verkoj, el inter kiuj la plej interesa, sendube, estas la mirinda verko La vivo de Fabiano de Cristo.

Cesar Reis estas ano de Lorenz, bonkora homo, vera homarano! Koran dankon, kara frato!

## SENPAGAJ LIBROJ

Ĉiuj kiuj loĝas ekster Brazilo rajtas ricevi niajn librojn, en Esperanto, tute senpage. Sufiĉas nur sendi vian kompletan nomon kaj poŝtadreson al editora_lorenz@uol.com.br.

Ankaŭ vi povas ricevi nian jarlibron, Almanako Lorenz, per pdf-a versio. Skribu al ni kaj vi ricevos, en la komforto de via hejmo, niajn librojn.

# ESPERO DE L' ĈIELOJ

*Maria Dolores, Spirito*

Ploro dumnokta...
Ĝemo dolorplena.
Povra ĵusnakito
ne trovinta lokon...
Sufokas kruelmanoj
etan homfloron...
Abortigo en demenca laboro
vundas la Leĝon per senpripenso.
Ha! Kiom da nobl-animoj,
en la planoj al mi familiaraj,
revantaj pri renaskiĝo,
tutvane almozpetadas...
Ŝirmiĝantaj en la amo,
ne sen konvulsiaj larmoj,
elpele batitaj estas
de sendankemo per frapoj.
Karaj Teranoj, aŭskultu min!...
Haltigu la abortigon,
per pli da ŝancoj
al la transtombaj kompanoj!...
Eĉ meze inter malhonorigoj,
ĉiu infano naskita,
estas espero de l'Ĉieloj
je venko de la Bono



El la libro *Karitato*, diktita de
Maria Dolores (Spirito) kaj psikografiita
de Francisco Cândido Xavier (Mediumo).
Eldono de IDE. Esperantigita de Ĵader Rodrigues da Silva.



**KUNLABORU!** – Membriĝu ĉe ASOCIO LORENZ kaj helpu la disvastigon de Esperanto kaj Spiritismo en la tuta mondo!

***COLABORE!*** – *Torne-se membro da ASSOCIAÇÃO LORENZ e auxilie a divulgação do Esperanto e do Espiritismo em todo o mundo!*


LORENZ

**"KOMUNIKOJ"**

TRIMONATA BULTENO DE LORENZ – SPIRITISMA ELDONA ASOCIO F. V. LORENZ

Fondita la 15-an de decembro 1975

Jaro 43-a – n-ro 177 | Januaro-Februaro-Marto 2020

Interreta kaj papera senpagaj eldonoj
Ĉirkaŭ dudek mil legantoj en la tuta mondo



**KONTAKTIĜU KUN NI KAJ ALIĜU:**

Spiritisma Eldona Asocio F. V. Lorenz
Rua Francisco Vale, 57 Engenheiro Leal
21370-171 Rio de Janeiro-RJ – Brasil (Brazilo)
Telefonoj: **+ 55-21-98485-4539** **+ 55-21-2450-4768**
Skajpo: **Lorenz Editora** | Fejsbuko: **Editora Lorenz** | Retadreso: **editora_lorenz@uol.com.br**
Retpaĝo: **http://editoralorenz.blogspot.com.br**





Kompostita de Rogério Mota

# Kuriozaĵoj el la leteroj de Zamenhof



89-18 l. al Majnov, 19.(31.) VII. 1889 (o.v. V-75)

Estimata amiko! - Laŭ via peto mi sendis al vi hodiaŭ unu ekzempleron de la "Meza vortaro" por la Gr. Pr. - Aldoni la gramatikon oni devas nur al la vortaroj nacia-internaciaj, por ke la uzanto povu mem krei la formojn gramatikajn; sed kiu uzas la parton internacia-nacian (por kompreni ion skribitan aŭ presitan), tiu tute ne bezonas la gramatikon, ĉar la gramatiko estas jam enhavata en la vortaro mem. -

La promesojn kaj ankaŭ la 12 kop. por vendita gramatiko mi ricevis. La unua numero de la gazeto estos dissendita al ĉiuj amikoj kiuj sendis promeson "senkondiĉe" - La adresaro eliros ne pli frue ol en Septembro. - Hodiaŭ mi sendis al vi la "Antaŭparolon al la malgranda vortaro" (kune kun vortaro). -

Promesoj "senkondiĉe" venis el diversaj landoj. - Multaj hebreoj ellernis nian lingvon.

- Respondante vian demandon pri mia religio, mi devas sciigi vin, ke mi estas nek katoliko nek Luterano, - mi estas hebreo.

(Fonto: Iom Reviziita Plena Verkaro de L. L. Zamenhof. Originalaro 1. Unua etapo de Esperanto – 1878-1895. Eldonejo Ludovikito, 1989.)

**Karaj geamikoj el la tuta mondo, se vi volos ricevi, senpage, pere de Interreto, pdf-ajn versiojn de Almanakoj Lorenz, sciigu al ni vian retadreson kaj kun granda ĝojo ni ilin sendos al vi: editora_lorenz@uol.com.br**

# INÁCIO BITTENCOURT, MISIULO DE LA MEDIUMECO

Eurípedes Alves Barbosa



**INÁCIO BITTENCOURT** naskiĝis en Portugalio, la 19an de aprilo 1862, kaj forpasis en Rio-de-Ĵanejro, la 18an de februaro 1943. Ankoraŭ tre juna li venis en Brazilon. Kiam li estis 10-jara li forlasis lernejon kaj fariĝis memlernanto, havigante al si solidajn konojn. Leginte la verkon La libro de la spiritoj, de Allan Kardec, Inácio fariĝis spiritisto en 1885. Tiam li komencis intensan laboradon por disvastigi spiritismon per prelegoj kaj artikoloj aperintaj en gazetoj.

Li havis sanigivan mediumecon kaj kontribuis por la resaniĝo de multe da homoj, ĉefe malriĉuloj.

Li fondis la ĵurnalon "Aurora" (Aŭroro) en la 1a de maio 1912, kies celo estis diskonigi la spiritisman doktrinon tra la tuta Brazilo.

Inácio kunfondis kaj prezidis la institucion "Abrigo Teresa de Jesus", la 1an de januaro 1919, por gastigi forlasitajn infanojn.

Dum du jaroj, li okupis la vicprezidantecon de Brazila Spiritisma Federacio, kaj estis prezidanto de "Centro Espírita Humildade e Fé" (Spiritisma Centro Humileco kaj Fido), kaj estris ties gazeton "Tribuna Espírita" (Spiritisma Tribuno). Inácio estis unu el la direktoroj de "Asilo Legião do Bem" (Azilo Legio de la Bono).

Kelkfoje li estis akuzata pro neleĝa medicina servo, sed juĝistoj senkulpigis lin. Malgraŭ sia malriceco kaj sia multnombra familio, Inácio dediĉis sin al Spiritismo kaj karitato. Li uzis sian mediumecon por helpi senpage suferantojn. En tiu tempo, multe da homoj en Rio-de-Ĵanejro konsideris lin apostolo kaj sanktulo.

Li estis elokventa oratoro, kiu sub la influo de Superaj Spiritoj paroladis pri spiritismaj temoj, montrante ĉiam sciencan kaj filozofian erudicion.

Laŭ noto publikigita de "La monde Esperantiste", eldono de februaro 1917 (paĝo 11), Inácio Bittencourt faris paroladon en la kvartalo Meier, Rio-de-ĵanejro, sub la titolo "La milito kaj spirita vidpunkto" kaj diris vortojn tre favorajn al Esperanto. Li estis sendube simpatia al nia kara idealo.

# BENJAMIN C. CAMOZATO

Alberto Flores – Brazilo



Benjamin Celestino Camozato estis pioniro de Esperanto en Santa Catarina kaj Rio Grande do Sul, sudaj brazilaj subŝtatoj. En Santa Catarina li fondis E-grupon en urbo Lajes, kaj en 1907, “Societon Sankta Katarino. En urbo Caçapava, kie li loĝis dum kelka tempo, li instruis Esperanton kaj ankaŭ fondis Esperanto-grupon. En la jaro 1927, en urbo Porto Alegre, kune kun inĝeniero Viterbo de Carvalho, li fondis la esperantistan societon “Sudbrazila Esperantistigilo” kaj fariĝis ĝia unua prezidanto.

Ankaŭ en Porto Alegre, dum multaj jaroj, li plenumis la oficon de fakdelegito de UEA (Universala Esperanto-Asocio) pri filatelio. Li estis fervora kaj aktiva membro de “Sociedade Filatélica Rio Grandense” kaj direktoro de la revuo “Rio Grande Filatélico”, oficiala organo de tiu societo, en kiu li publikigis diversajn artikolojn favorajn al Esperanto.

Profesie, Camozato estis dentkuracisto, diplomita en 1904 de la Kuracista Fakultato de Porto Alegre.

Li estis unu el la malmultaj brazilanoj, kiuj interkonatiĝis persone kun D-ro L. L. Zamenhof, la kreinto de Esperanto. Tio okazis dum la 4-a Universala Kongreso de Esperanto, en Dresden, Germanujo (Aŭgusto, 1908), en kiu li ĉeestis kiel reprezentanto de “Esperanto-Societo Sudriogranda” (fondita en Porto Alegre, 1906). Post multaj jaroj, Camozato denove partoprenis en universalaj kongresoj: la 34-a, en Bournemouth, 1949, kaj la 35-a en Parizo, 1950.

Benjamin C. Camozato estis tre konata kiel esperantisto kaj kiel filatelista kunlaboranto en diversaj ĵurnaloj de Porto Alegre. Li estis honora prezidanto de “Esperantista Societo de Porto Alegre” (fondita en 1945).

En la jaro 1957, li partoprenis en la 15-a Brazila Kongreso de Esperanto, okazinta en Niterói (Ora Jubileo de Brazila Esperanto-Ligo) kaj tie prezentis tre interesan raporton pri Esperanto en Rio Grande do Sul. (Paĝo 331 de “Anais do XV Congresso Brasileiro de Esperanto).

79 jaraĝa, li mortis en Porto Alegre, je la 4-a de majo, 1964. Li lasis vidvinon Acidália kaj tri gefilojn. Tre afabla, simpatia kaj laborema homo, Camozato estis neforgesebla idealisto kaj propagandisto de du kulturaj iloj: Esperanto kaj filatelio.

El Almanako Lorenz 2017. Se vi volos ricevi Almanakon per pdf-a versio, skribu al editora_lorenz@uol.com.br

Kara samideano!

Jam estas tempo por via realiĝo al nia Asocio, aŭ, se vi ankoraŭ ne estas ano de Lorenz, ankaŭ estas tempo por tion fari. Se vi aliĝos al Lorenz, vi ricevos du librojn, elektitajn de vi el nia katalogo, sed ankaŭ la jarlibron, **Almanako Lorenz** kaj la trimonatan bultenon **Komunikoj**. Plie, 30% da rabato por aĉeto de niaj libroj.

Lorenz, 45 jaroj por paco kaj frateco inter la homoj!

*“La laboro de Eldonejo Lorenz aparte riĉigis la kulturon de Esperanto. Sen la informoj pri Spiritismo, pri Oomoto aŭ pri la bahaanoj, la kulturo de Esperanto estus multe pli malriĉa. Finfine la movado por Esperanto estas parto de ĉi tiuj movadoj, kiuj provas plibonigi la mondon”.*

Dankon, Eldonejo Lorenz, pro via laboro!

Renato Corsetti

**Senpagaj Libroj...**

Ĉiuj kiuj loĝas ekster Brazilo rajtas ricevi niajn librojn, en Esperanto, tute senpage. Sufiĉas nur sendi vian kompletan nomon kaj poŝtadreson al

editora_lorenz@uol.com.br



# LA KRISTANA KULTO EN LA HEJMO

## Néio Lúcio, Spirito

**LA ĈIELO PLENIĜIS** je steloj en la lunarĝenta nokto, kiam la Sinjoro, kelkatempe loĝanta en la domo de Petro, ekprenis la sanktajn skribaĵojn. Kvazaŭ li dezirus meti en novan direkton la konversacion, kiu fariĝis senfrukta kaj malpli edifa, li bonkore diris:

— Simeono, kion faras fiŝkaptistoj antaŭ ol kunporti al foiro la ĉiutagajn kaptaĵojn?

La apostolo iom pripensis kaj respondis hezite:

— Majstro, kompreneble ni elektas la bonajn fiŝojn. Neniu aĉetas la restaĵojn el la fiŝkaptado.

Jesuo ridetis kaj demandis plu:

— Kaj la argilaĵisto? Kion li faras por plenumi sian taskon?

— Certe, Sinjoro – respondis la fiŝkaptisto surprizite – li modelas la argilon donante al ĝi la formon, kiun li deziras.

La ĉiela amiko daŭrigis kun kompata kaj brila rigardo:

— Kaj kiel faras ĉarpentisto por plenumi la laboron, kiun li celas?

La tre simpla interparolanto respondis senhezite:

— Li prilaboras lignon per rabotilo kaj segilo, martelo kaj ĉizilo. Alie li ne perfektigos la krudan pecon.

Jesuo silentis por momento kaj aldonis:

— Tia estas ankaŭ la hejmo en la mondo. La doma lulilo estas la unua lernejo kaj la unua templo de la animo. La homa loĝejo estas la efektiva eksportanto de karakteroj en la eksterhejman vivon. Se negocisto antaŭelektas la varojn kaj lignaĵisto ne faras barkon sen prilaborado de ligno, kiel oni esperos pri sekura kaj trankvila komunumo sen ke la hejmo perfektiĝadu? La paco en la mondo komenciĝas sub la tegmento kien ni retiriĝas. Se ni ne lernos vivi pace inter kvar muroj, kiel ni esperos pri la harmonio de la nacioj? Se ni ne povas ami la plej proksiman fraton, aliĝintan al niaj ĉiutagaj luktoj, kiel ni respektos la Eternan Patron, kiu ŝajnas al ni malproksima?

Nenion dirante Jesuo ĉirkaŭrigardis en la modesta ĉambro kaj baldaŭ daŭrigis:

— Petro, ni estigu ĉi tie novan lumon ĉirkaŭ tiuj, kiuj serĉas fratan helpon ĉe ni. La tablo en via hejmo estas la ŝirmejo por via pano; sur ĝin vi ricevas de Dio nutraĵon por ĉiu tago; kial ne establi ĉirkaŭ ĝi kulturejon de feliĉo kaj paco per niaj pensoj kaj konversacioj? La Patro, kiu donas al ni tritikon por la provizejo per la grundo, sendas al ni lumon per la ĉielo. Kiel heleco fariĝas pro la disiĝado de ties radioj, tiel abundeco komenciĝas de grajno. Pro tio la Evangelio ne komenciĝis en homamaso, sed en simpla loĝejo de paŝtistoj kaj bestoj.

Simeono Petro alrigardis la humilajn kaj klarajn okulojn de la Majstro, kaj ne trovinte taŭgajn vortojn por esprimi sin, li murmuris kuraĝete:

— Majstro, tiel estu, kiel vi deziras!

Tiam, invitante la familianojn de la apostolo al edifa interparolado kaj supera pripensado, Jesuo malvolvis la saĝecajn skribaĵojn kaj malfermis sur la Tero la unuan kristanan studkunvenon en la hejmo.

El la libro *Jesuo en la hejmo*, diktita de la Spirito Néio Lúcio kaj psikografiita de la mediumo Francisco Cândido Xavier. Eldono de Brazila Spiritisma Federacio. Esperantigita de Leandro Abraão.

## PETO

Laŭ peto de nia ano kaj samideno Vladimir Zurowskij, el Litovio, li sciigas, ke intencas viziti Brazilon en 2021 kaj vojaĝi per biciklo, tra diversaj ŝtatoj de nia lando.  Se vi volos scii pli detalojn, skribu al li: Toikos 14-4, LT-18117 Svencionys – Liefuva / Lituânia.



# Ne miru!

Abel Gomes - Brazilo

Ne miru, frato ke mi ion
Ellernis en la viv' astrala;
Postmorte povas la spirito
Progresi en la sci' reala.

Surtere el semet' malgranda
Eĉ alta arbo kreski povas;
Animo ĉiu en ĉi mondo
Pliperfektiĝi eblon trovas.

Dependas ĉio de la volo
Kaj de l' altec' de l' idealo;
L' animo povas progresadi
Sur mont', sur eben', en valo.

Se, tamen, ĝi ne volas lerni,
Neniu lerni ĝin devigos.
Libera estas ja l' animo,
Nur ĝia propra vol' ĝin ligos.

La propra vol' al ago ligas,
Per ag' atingas ĝi la celon;
Volita ago naskas ĝojon
Kiele la abel' mielon.

# Não te admires

Não te admires, meu irmão,
que na vida astral eu tenha aprendido um pouco;
depois da morte o Espírito
pode progredir no real saber.

De minúscula semente na terra
pode crescer grande árvore;
toda alma neste mundo
encontra meios de aperfeiçoar-se.

Tudo depende da vontade
e da elevação do ideal;
a alma pode progredir,
esteja sobre montanha, em planície ou no vale.

No entanto, se não quiser aprender,
ninguém a isso a forçará;
a alma é de fato livre,
presa somente à sua vontade.

A vontade prende a alma à ação
e por esta atinge ela o alvo;
a ação praticada pela vontade produz alegria,
assim como a abelha produz mel.

*Reformador* (FEB), Jun 1946, p. 125 | Kunlaboris: Aymoré Vaz Pinto

**"Vivu Esperanto, sed antaŭ ĉio vivu la celo kaj la interna ideo de la esperantismo, vivu la frateco de la popoloj, vivu ĉio, kio rompas la murojn inter la gentoj, vivu, kresku kaj floru la verda standardo!"**

**Parolado de Zamenhof en la tria universala kongresso en Cambridge, Britio, la 12an de Aŭgusto 1907.**

# VIVU FELIĈA



Atentu pri la negativaj moralaj fantazioj,
kiuj efikas la kampon de la sekso, kaj de perversiĝa emocio.
Ili enradikiĝas en la mensaj ekranoj,
kaj kreas afliktigajn dependecojn,
kiuj transformiĝas en malekvilibrojn kaj turmentojn.
Kion vi kulturu per la imagopovo, tio
povas fariĝi helpanĝelo, se nobla, aŭ fantomo, se vulgara.
Estas gravaj moralaj agoj sur la fizika kampo,
sub instigo de halucinaj mensaj pasioj.
Pensu kaj agu harmonie.
Kulturu edifajn ideojn, kaj vi estos feliĉa.

Spirito: Joanna de Ângelis
Mediumo: Divaldo Pereira Franco – Brazilo